



PENSEO

N-ro 332

jun. / 2019

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



Mallejado

Tempo pasas kaj transpasas
la kradojn de l' kalendar'...
Tagoj, semajnoj, monatoj:
vortoj, fotografiaĵoj
jen la poeton defias.

Denove majo hezitas:
ĉu varm' aŭ malvarm' ĉi-foje?
Sed ne gravas por la koro
la kapricoj de l' klimato:
atentas ĝi l' animvoĉon.

La datreveno alarmas,
kiel sonoril' en lerneĵ',
kie maldiligentuloj
tute mallerni bezonas
la erarajn lecionojn.

Ĉu la vivtempo sufiĉos?
Tiom da studo valoras
sub la polv' de inercio?

Juiz de Fora, 22/05/2019.

Dimitrije Janičić (Serbio)



LA BASKULO

La tuta homa vivo
kaj nia destino
dum la falo aŭ la kulmino
male al ĉiu doktrino

ĉe viroj kaj ĉe inoj
ĉe milo aŭ ĉe la nulo
ĉiam io similas al baskulo.

La komenco kaj la fino
la honoro kaj la gilotino,
la ploro kaj la rido
la dolĉaĵo aŭ la acido,
la nasko kaj la morto
la subtilo aŭ la forto,
la infero kaj la paradizo
la konkludo post analizo
vi metu ĉion antaŭ spegulo
ĉio similas al la baskulo.

La ripozo aŭ la laboro
la tristeco post la humoro,
la infano fariĝos la oldulo
la kosmo de la molekuloj,
la lumo staras apud la obskuro
la alveno kontraŭ la forkuro
ĉiam malo kontraŭ egalo.

Nigra kaj blanka,
centra aŭ flanka,
la animo aŭ la korpo,
la citrono kaj la sorpo,
la certeco aŭ la probablo,
eble la Dio aŭ la diablo.

Dum tuta vivo – dilemoj,
ne funkcias sistemoj,
ne ekzistas certaj skemoj,
ne validas neŝanĝeblaj teoremoj.

Ĉiam baskulo
inter du finoj
ĉiam serĉado
pli bonaj destinoj.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



fotis Amy Chang (facebook)

ĜUO

Luno, montoj, lago.
Jen homoj dum velvago.

Kolore ĉio bluas,
kaj mi la pacon ĝuas...

BUDHANOJ EN REVO

Ĉi tio estas revo,
kompaso de sendevo.
Budhanoj revdormetas,
dum Luno tre sekretas.

BLUA PACO

Blua paco,
kiel donaco.
Ĉe velboatduo
varias la bluo.

LUNO

Luno
pacajn
lagojn
ŝatas.

Luno
kvazaŭ

pace
fratas.

Naskiĝtago, naskiĝtago!

Kara mia, kia plago,
ĝis naskiĝtag' nur plu tago.
Mi cerbumas ĝis agac',
kio estus do donac'?

Ĉu ĉifoje blanka rozo,
aŭ hotel- kaj plaĝripozo?
Ĉu krom tio skribpapero?
Aŭ testuda id' el fero?

Ĉu skatolo kun pralinoj,
konsilaro nur por inoj?
Ĉu ĉapelo por la kapo?
Aŭ papago kun vortfrapo?

Elefant' el verda jado,
aŭ ĉu, kara, marmelado?
Naskiĝtago via venas,
mi pro streĉo preskaŭ svenas.

Moke diras mia kapo:
“Ne sufiĉus verda sapo.”
Ĉu por ambaŭ filmbileto
aŭ semajn' sen interreto?

Ne tro kostus min amoro,
kisoj multaj kun fervoro.
Sed ĉar ĝi ne sensacias,
vi supozus, ke mi fias.

Kion fari, mia kara?
Sama plago ĉiujara.
Kiu pagu ĉion tion?
Kiel doni ne nur ion?



Lily (Ĉinio)

Ĝui solecon

en mia forlasita domo
tutsola mi meditas
mia penso vagas ien-tien
de ĉielo al la tero
de monto al rivero
mi vizias la knabinon
kiu promenas kun mi
sur la kvieta pado
kiu ĉasas min sur plaĝo
kiu kveras en mia brakumo
kiu firme tenas min je la mano
kiam ŝi estas alnajlita
al la lito je la fina momento
Mia kara edzino ŝi estas
dum kelkdekaj jaroj da kunvivado
malfeliĉe ŝi foriris por ĉiam
eble al la bela loko
kie pompas aromaj floroj
kie riĉas herboj kaj fluoj

mi subite aŭdas
tiktadon de pluvo
ekster la fenestro
kvazaŭ varma duŝo
sub kiu ni petolas
korpo kun korpo nudaj
kun vervo, kun pasio
ŝi ĉirkaŭprenas min
mordetas mian kolon
mi ricevas ŝian alpremon
kaj kisas ŝiajn ŝultrojn
odorantajn je ŝampuo
ŝi stringe ambaŭbrake prenas
mian kolon kaj ŝmace kisas
mian mentonon kaj bruston
mi vere sentas frotadon
de ŝiaj molaj mamoj
kaj mi jam moliĝas
je torso kaj femuroj...

antaŭ miaj okuloj
fluas lirlanta roĵo
kies akveroj ŝprucas
kaj frapas la bordojn
borderitaj de verdaj arbustoj
mia penso vagas
al la plaĝo, kie ni ludas
per akva batalo
ŝi puŝas akvon al mia kapo
kaj mi puŝas rebate
kun ridoj kaj krioj
ni surbordiĝas kaj ĉasas
unu al la alia kapreole
mi kaptas ŝin kaj premas ŝin
sur varmetan sablon
ŝi laŭte krias "helpon"!

tagoj pasas akvflue
mi meditas pri horo post horo
ŝi ĉiam vivas en mia imago
kaj mi akiras konsolon
el la kunesto de ni du
mi ne estas soleca
mi vere ĝuas solecon
en la forlasita domo
ha, pasintaĵoj jam pasis
sed ili nun plenigas
mian vivon kaj igas
mian monotonan vivon
enhavoriĉa kaj vervoplana
mi ne povas forgesi
la neforgeseblajn paseojn
mi ĝuas ilin
en mia celibata vivo

Eto (Ĉinio)

Homo sen libereco

Pro kancero li ligitas al la
malsanlito dum la tuta tago.
Sub ofta atak' de morb' letala
li apenaŭ spiras sen ajn ago.

Akompanas lin nur kuraciloj:
la kemi- kaj radi- terapioj,
glutpiloj kaj dolor-suspiroj,
kaj ĉiamaj pogutig-serioj.

Lin ĉirkaŭas nure blank-koloro:
kuracistoj, flegistinoj multaj,
litkovriloj kun acid-odoro
kaj konsolaj vortoj tre tumultaj.

Jam putriĝas lia viva penso
mallibera en mortinta menso.



Papos Nascentes (Brazilo)



SALTO

la salto allogas min min malsituas
dum miljaroj el fonto projektata
ekscitas min sed ne min konstituas

vizitis mi vakuon kaj varion
nur mi revenas per flugo flotanta
la vorticon senfinan de l' unuo
mia falo: ascendo malrigardata

Suno

agas koro kuraĝe
dum antaŭgasa malfermo
de l' projektita nuboj

la blovo Suna de l' Si-mem
per kiso plenluma
fajru la navigadan kandelon



Yanke (Ĉinio)

Ploranta Ĉielo

la tuan tagon
sub premo de vetero malsarena
mi apenaŭ povas spiri
mi etendas manon
ekster la fenestron
por senti
la falantan pluveton
kvazaŭ larmon de la ĉielo
subite la pluveto foriĝas
anstataŭe venas pluvŝtormo
kvazaŭ la ĉielo volus
elsputi sian koleron
post longa plorado
mia koro
nereneteneble
peziĝas kiel la ĉielo

kien vi iris
varma suno?
kiam vi revenos
revenos
por dispeli
la grizajn nubojn
el la koro de la ĉielo
tiel ke ĝi povu
revidi la lumon?

Svetlana Konyashova (Rusio)



Hajkoj

Abeloj maje
super floroj akorde
kaj gaje zumas.

En maja herbo
“naĝas” kat’ — “boateto”
kun vosto — “velo”.

Pluvo en majo.
Nekonata kato sur
betulo sidas.

Floranta majo.
La katino portas en
dentoj serpenton.

Plor' de testudo.
Naturo tristas kaj mi
melankolias.

Maten' nebula.
Branĉoj kun floroj ree
impetas alton.

**

Marto. Sur neĝo
freŝa sub la fenestro
sola pirulo.
Marte traflugas
kun branĉeto en beko
por nesto pigo.

Jadranka Miric (Serbio)



Lazuras ĉiel'.
leontodo ekfloris.
Herbej' flaviĝas.
Soifa tero.
Senventa posttagmezo.
Arboj silentas.
Maja foiro.
Aŭdiĝas gajaj krioj
ĝis profunda nokt'.
Senĉesa pluvo.
Verdas tera tapiŝo.
Maja ŝtormeto.

**

Ĉiela lazur'
Verda, gaja pikniko.
Multkolora drak'.
Subita ŝtormo
Ekscititaj kriaĉoj.
Aprila ŝerco.

El Ĉina Antikva Poezio

Cui Hao (? - 754)

La pavilono Flava Gruo*

Per flava gruo senmortulo delonge forflugis,
Ĉi restas nur forlasita l' pavilono Flava Gruo.
De tiam ĝi neniam estas foje reveninta,
Miljare blankaj nuboj ŝvebas en soleca bluo.
La turo Qingchuan kaj en Hanyang arboj
distingiĝas,
Aromaj herboj pompas sur la sablobenk'
Yingwu'o.
Vesperkrepusko baras vidon. Kie la
hejmloko?

Hejmveon en mi vekas la nebula riverfluo.
**La pavilono Flava Gruo: kiu, plurfoje rekonstruita, situas en la urbo Wuhan ĉe la suda bordo de la rivero Jangzio, kaj norde de ĝi, tiam, kiam la poemo formiĝis, sin trovis la turo Qingchuan kaj la sablobenko Yingwu; la loko Hanyang nun estas parto de Wuhan.*

Cui Tu (? - ?)

Survoja ĉagreno

Egale senkompatas ĉu akvfluo aŭ florfalo,
Trapasas mi Chu* kun finiĝo de printempa
vento.
En songo la hejmlando foras dek mil liojn,
Noktmeze brilas super l' rododendroj la
krescento.

Ofte post jaro eĉ ne venas al mi hejmlerato,
La haroj ĉe l' tempioj iĝas grizaj en momento.
Mi povus rehejmiĝi, se mi volus; mi ermite
Satĝuus la pejzaĝon en nebula akv-etendo.

**Chu: nomo de la regiono, kiu ampleksis proksimume la nunajn provincojn Hunan kaj Hubei. La aŭtoro longe kaj malproksime vojaĝis kaj loĝis for de sia naskiĝloko, la provinco Zhejiang.*

Du Fu (712 – 770)

La vilaĝo ĉe l' rivero

Rivero klara fluas ĉirkaŭ la vilaĝo,
 En longaj somertagoj mi senzorgas tie.
 Al aŭ de traboj hirundoj libere flugas;
 Sur akvo laroj intimiĝas softekrie
 L' edzino surpapere pentras ŝaktabulon;
 El pingl' fiŝhokon faras mia fil' pasie.
 Krom kuracilo kontraŭ la malsano mia,
 Kion alian mi postulas ambicie?

Zhang Lei (1054 – 1114)

En someraj tagoj

La tagoj someraj serenas en vilaĝ' rivera,
 La etaj hirundoj elkreskas subtegmentorande.
 Buntaj papilioj dancadas inter floraj branĉoj,
 La araneaj' domangula flagras briliante.
 Kurteno invitas la ombron de luno eniri;
 Aŭskultas mi l' bruon de fluo lite
 flankkuŝante.
 Neĝblankas la haroj tempiaj, longe griziĝintaj,
 Simple deziras mi vivon ermitan konstante.



Dai Fugu (1167 – 1252?)

Sur boato en luna nokto

La boato saturita de lunlumo
 Dronas kvazaŭ en etero.
 La helverda akvo glate senondeta
 Spiras froston en aero.

Mia poezia patosemo flosas
 Ombre de la mastoj hante,
 Kaj la lirikismo drivas en la plaŭdo
 De remiloj songolande.

Tiuj surĉielaj steloj sin spegulas
 Sur freŝverda lago sole;
 Krias sovaĝaj anseroj en akv-herboj
 Kontraŭ la vento gakplore.

Kelkaj ŝiplanteroj flagras ĉe l' pramejo,
 Kiu de pratemp' ekzistas;
 Gutas rosoj de platanaj ĉe l' rompita
 Ponto, kiu ja persistas.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)

Liu Yong (ĉ. 984-1053)

Ekde la printempa komenco

—laŭ melodio *Subigo de ŝtormo*
 Ekde la printempa komenco
 ruĝaĵo jen tristas kaj verdo
 malĝojas en mia okulo.
 Mi ne intereson ekhavas
 pri ĉia afero enhejma.
 Leviĝas la suno en brulo
 jam super arbpinto salika,
 kaj la orioloj navedas
 en branĉoj jen kun sonmodulo.
 Ankoraŭ mi nestas en lito
 volvate per varma veluro.
 Jen mia pufeta belkorpo
 nun magras pro ama sopiro,
 kaj mia hararo en rulo
 taŭzita, malorda, falpenda.
 Tuttage malemas mi kombi,
 ekŝminki jen kontraŭ spegulo.
 Ekde la foriro de l' edzo,
 li eĉ ne alsendas mesaĝon.
 Ve, kiel sentmanka la ulo!

Mi pentas, ke mi ne retenis
 lin tiam: kial mi ne ŝloŝis
 la selon, ke lia veturo
 neniam sukcesis laŭvole?

Mi volus lin fiksi en hejmo
 ke ĉantus li versojn al muro,
 jen ĉirkaŭ la ĉambro proksime.
 Ankaŭ mi ja ne lin evitus,
 tagnokte apud lin sen kuro.
 Kudradus mi en akompano,
 alpreme al li tre intime.
 Mi volus vivi en plezuro,
 kune kun li ja harmonie,
 trasperti la tempon ĝis morto.
 Ne devus per mensa torturo
 mi lasi junecon forflui,
 malsaĝe atendi lin vane,
 suspiri pri li en obskuro.

Cikadoj ĉirpas triste tre

—laŭ melodio *Tintado en pluvo*
 Cikadoj ĉirpas triste tre,
 vespere pluvo ĉesis ĵuse
 ekstere de l' kiosk' etapa.
 Mi restas senhumora ĉe
 festen' por adiaŭi min.
 Dum ne-emado al disiĝo,
 min oni urĝas al boato de
 veturo eĉ de temp' al tempo.
 Ni man-en-mane nun rigardas
 jen vid-al-vide kun okuloj je
 larmeroj plenaj sentovarme,
 eĉ senparolaj plorsingulte.
 Moroza mi fariĝas je l' ide'
 pri ekveturo al la sudo
 sub krepusk-fumnebul' mil-lia.

De antikveco oni diras, ke
 disiĝo estas plej ĉagrena,
 des pli dum la rigor' aŭtuna.
 Kiam mi el ebri' sobriĝos re,
 kie troviĝos mi fremdloke?
 Ĉe bordo kun salikoj eble,
 lunark' sin kaŝas tuje al pere'
 sub blov' de briz' matena friska.
 Dum multaj jaroj — ho ne, ne! —
 mi vivos iele-trapele tie.

Mi certe ne ĝuados ĝin, eĉ se
 ĝi estos la pejzaĝo bela
 sub la veter' serena brile.
 Al kiu povus mi paroli
 pri miaj ĝenoj kaj ĉagrenoj? Ve!



Ar' da marĉanasoj

—laŭ melodio *Tostanta pokalo*
 Ar' da marĉanasoj flugas
 sur la benkon en blankprujno gela,
 kaj sovaĝanseroj ĉirkaŭflugas
 en la nebulita insulet' malhela.
 Tio ja prezentas la aŭtunetoson
 per pentraĵo rava, bela!
 En vespera pluvo, kiu ĵuse ĉesis,
 mia boatet' leĝera
 haltis kaj ankriĝis ĉe la bordo.
 Kaj mi en vilaĝa ĉambr' hotela
 lue loĝas por tranokto.
 Ĝuste tiam fluto sonas triste
 en la vento nubpela.
 Tio vekas ĉe mi disiĝo-ĉagrenojn
 de vagad' sencela.
 Inter herboj griloj ĉirpas
 ĝene ĉe la bord' rivera.

Ekde la disiĝo
 mi kaj mia amatin' tenera
 ja baratas de riveroj, montoj,
 de ŝi la mesaĝ' letera
 jam ne povas min atingi.
 En imago mia ŝi miela
 ne ekscias pri mi disvaganta
 kiu dronas en mensspirit' sufera
 kaj pro tio multe malgrasiĝas.
 Rendevuoj inter ni jam ne plu
 reokzos pro disiĝ' kruela,
 miaj vinamikoj nun ne ĉi tieas.

Mi nur drivas en soleco
 kaj diboĉas laŭ la vol' libera.
 Ekrigardo al ĉefurbo vualita
 per verdaĵoj jen aldonas al mi
 multajn ĝenojn kun humor' despera.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Mimoza Ahmeti (Albanio)



Ĉion mi jam rememoras

Klare rememoras mi ĉion:
 La malvarmajn noktojn vintrajn.
 Nian amon- ardan torĉon
 Enflagritan en la arbaron!
 Ĉion sur glaciigintaj branĉoj mi
 kantis
 per milda, sopirema voĉo!
 La lumo la glacion blankan diserigis
 sur nia ĉirkaŭprenita korpo.
 Je miro ni ne emis paroli
 tiun horon en duonlumo
 De niaj buŝoj la profunda silento
 Pli bone ja scipovis paroli....
 Unu post la alia ĉiuj noktoj
 Al ties unua nokto ĝemadas:
 Neeblas
 en ĉi tiu mondo
 ke ni alpaŝu disigitaj!

Ci ne scias

Ci ne scias kial mi la aŭtunon amas

Ĉar maltrankvilajn formojn la ties ĉielo
 ricevas...
 Kaj la sekaj folioj krucmilitiradojn invadas

de la malproksima Oriento ĝis la
 Okcidento...

La animo de la aŭtuno
 ne estas ia antaŭjuĝa kaprico!



Iĝu bela

Iĝu bela ĉivespere!
 Forpelu disde la memoro la kverelojn, forigojn
 kaj brutan silenton

Rememoru pri mi.
 Kaj vin mem!
 Venu kantante virkazonon pri la vivo!
 Ne gravas kiel, nur bravan kanton komencu,
 Per revotufo, kiel birdotufo
 malfermita je miloj da direktoj!

Ne malgrandanima,
 nek malvasta!

Ĉivespere
 ci estu vigla, mastro de la naturo kaj si mem
 iam ajn!
 Mi volas cin apude! Min komprenu!
 Mi soifas pro CIAJ brakoj sur miaj ŝultroj,
 por ripozigi mian kapon sur CIA kolo
 kvazaŭ sur la kverka kolo!
 Ne demandas cin la malprofundo sed la
 profundo.

Mi volas cin honesta, malmultvorta kaj saĝa;
 Lacigita pro la laboro, sed neniel pro la vivo!
 Estu ci pura, kaj akvodoru kiel ŝtono!

Mi volas cin senfina, la eblecon min mezuri
 havu!

Mi volas cin potenca, por levi min tutan,—
 korpe kaj reve!

Por ke poste, reveninte, post vespero

kaj ĝis malfrue nokte, mi versojn skribu
multfoje pli bela kaj pli kuraĝa
ol ĉi tiuj jam skribintaj.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKOKA

Perfekta Ĝojo

§18-05

Kiam Yan Hui, disĉiplo de Konfuceo, ekvojaĝis orienten al la regno Qi, Konfuceo havis maltrankvilan mienon. Zigong, alia disĉiplo de Konfuceo, stariĝis de sur sia sidmato kaj demandis: “Ĉu mi povus permesi al mi demandi, kial la vojaĝo de Yan Hui vin maltrankviligas?”

“Bonan demandon vi metis! Iam mi aŭdis diron de Guanzi, kiun mi ĉiam trovas vera. Li diris: ‘La malgranda sako ne povas enteni grandan objekton; ŝnuro tro mallonga ne povas atingi la fundon de puto.’ Tiu ĉi diro signifas, ke la Destino antaŭdecidas ĉiujn aferojn kaj ke ĉiu el tiuj aferoj havas sian propran antaŭdeciditecon, kiu estas neniel ŝanĝebla. Mi timas, ke Yan Hui parolos kun la regnestro de Qi pri la manieroj de la regado de la reĝo Yao, la reĝo Shun kaj la Flava Imperiestro kaj la instruoj de Suiren kaj Shennong. La regnestro de Qi ekzamenos sin mem en siaj pensoj kaj trovos la vortojn de Yan Hui super sia kompreno. Li estos en duboj pri tio, kion li ne komprenos, kaj sekve povos mortigi Yan Hui pro malfido.

“Ĉu vi neniam aŭdis pri la rakonto pri mara birdo, kiu sidiĝis ie proksime de la ĉefurbo de la regno Lu?

La suvereno iris persone por bonvenigi ĝin kaj proponi al ĝi bonan vinon. Ĝi estis portita en la Prapatran Templon, kie la muziko *Jiushao* estis ludata por amuzi ĝin, kaj porkaĵo, bovaĵo kaj ŝafaĵo estis preparitaj por nutri ĝin. Konfuzita kaj malgaja, la mara birdo ne kuraĝis manĝi eĉ unu pecon da viando, nek trinki eĉ unu guton da vino; kaj ĝi mortis en la tria tago.

“La suvereno provis prizorgi la birdon kvazaŭ li prizorgus sin mem. Por prizorgi la birdon en ĝia propra maniero, necesus lasi al ĝi sidi en profunda arbaro, libere flugi super insuletoj, flosi en la riveroj kaj lagoj, nutri sin per angiloj kaj aliaj fiŝetoj, flugi kaj ripozi kun aliaj birdoj de sia speco kaj vivi laŭ sia plaĉo. Kial fari tian laŭtan bruon al la birdo, kiu forte abomenas la homan voĉon? Se la famaj muzikaĵoj *Xianchi* kaj *Jiushao* estus ludataj sur la sovaĝejo, la birdoj forflugus, la kvarpieduloj forkurus, kaj la fiŝoj profundigus al la akvofundo. Nur homoj venus kaj kolektiĝus por aŭskulti la muzikon. La fiŝoj gaje vivas en akvo, dum la homoj mortas en la akvo. Ĉar la diferencoj ekzistas inter la homoj kaj la fiŝoj, ili devas havi ankaŭ diferencajn ŝatojn kaj malŝatojn. Jen kial la antikvaj saĝuloj ne esperis, ke ĉiu havos la saman talenton aŭ plenumos la saman aferon. La nomoj devas konformi al la efektiveco, kaj la deco devas konformi al la cirkonstancoj. Tio estas nomata “la kompreno de la universala leĝo de la naturo kaj la ĝuado de la eterna beno”.

§18-06

Iam Liezi faris vojaĝon. Li hazarde vidis centjaran kranion tiam, kiam li ripozis kaj manĝis sur la vojrandoj. Li eltiris el la tero herbon kaj direktis ĝin al la kranio, dirante:

“Nur vi kaj mi scias, ke vi ne mortis, nek vivis. Ĉu vi vere malĝojas? Ĉu mi vere ĝojas?” (El la vidpunkto de Liezi, la kranio estis mortinta, dum li estas vivanta; sed el la vidpunkto de la kranio, Liezi estas mortinta, dum ĝi mem estas vivanta. La morto kaj la vivo estas en senfina transformiĝado unu en la alian, kaj tial, en la lasta analizo, ekzistas ja nek vera morto, nek vera vivo — trad.)

§18-07

Inter la diversaj specioj estas mikroorganismo

kiu propagiĝas en la akvo. Ĝi fariĝas musko sur la akvomargeno kaj ĝi fariĝas plantago sur la altaĵoj. La plantago fariĝas akvoplantago, kies radiko fariĝas la larvo de la sterkoskarabo kaj kies folio fariĝas la papilio. Baldaŭ poste la papilio fariĝas insekto en formo de deĵetita haŭto. Tiu insekto, kiu estas nomata *quduo*, vivas sub la kuirformo. Post mil tagoj la *quduo* fariĝas birdo nomata *ganyugu*, kies salivo siavice fariĝas insekto nomata *simi*, kiu siavice fariĝas ankoraŭ alia insekto nomata *shixi*, el kiu naskiĝas la insekto nomata *yilu*. La insekto nomata *huangkuang* naskiĝas el la insekto nomata *jiuyou*; la insekto nomata *maorui* naskiĝas el la insekto nomata *fuquan*. La herbo *yangxi* vivas kun la bambuo, kiu jam ne ŝosas, kio naskas insekton nomatan *qingning*, kiu siavice naskas la leopardon. La leopardo siavice naskas la ĉevalon, kiu ree siavice naskas la homon. La homo, siavice, revenas al la mikroorganismo. Ĉiuj estaĵoj en la mondo venas el mikroorganismo kaj revenas al ĝi.

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Miric Jadranka (Serbio)

Malvarma printempo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Printempo
en Majo pluvon
kaj vintron alportis. Ve.
Ni esperas suneton
vidi en London.

Malvarmaj
tagoj. Revido
de kurbiĝantaj homoj

sub ombreloj. Kunsido
urĝa sen rido.

Tornado
ĉe najbaro fi
aspektas. Danĝero. Ho!
Timas mi pro ĉiel' ĉi.
Pala kiel Vi.

Inundojn
prognozas oni.
Nek resaniĝis ni de
pasintaj. Preĝu al Di'
por nin pardonni.

Pro natur'
por savi Teron.
Endas purigi akvon
kaj recikli rubaĵon
Redonu Sunon!

Maja suno

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Kvieta
maten'. Odoras
akacio. Abeloj
tien alien zumas.
Mielon donas.

Ekfloris
kaŝtenoj oldaj.
Jen turtoj kveras gaje.
Nestoj vigliĝas. Bruaj
birdoj flugantaj.

Sonoril'
preĝeja laŭte
vokas vin por ĉeesti
baptofesto. Ŝin tute
li stiros aŭte.

Suna rid'
varmigas koron.
Kurta paŭzo inter pluv'

Ĝuu vi bonhumoro
kaj dancu oron**.

**Oro /kolo serbe/-la serba danco-rondo

Luiza CAROL (Israelo)

SOPIRO EN APRILO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Kunulon
la birdo trovas,
preparas neston ame.
La brizo milde blovas.
La vivo novas.

SOPIRO EN MAJO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

El ovoĵ
eliris idoĵ
kun fragilaj flugiloĵ,
okuloĵ kiel bidoĵ,
gajaj pepstridoĵ.

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Zhu Ziqing (1898-1948)



Lotuslageto en lunlumo

Dum ĉi tiuj kelkaj tagoj mi sentas min tre malkvieta. Ĉi-nokte, kiam mi refreŝigis min per freŝa vento en la korto, mi subite ekpensis pri la lotuslageto, kiun mi preterpasas ir-reire ĉiutage. Sub la lumo de la plenluno ĝi certe aspektas alie ol en aliaj tagoj. La luno leviĝas alten iom post iom. Forsvenis ĝojkrioj de la infanoj sur la strato ekster la ĉirkaŭmuro. Mia edzino, kiu frapetas nian fileton Run'er endome por luligi lin al dormo, zumas lulkanton dormeme. Ĵetinte robon sur miajn ŝultrojn ŝtele, mi eliras kaj fermas la pordon post mi.

Laŭ la lotuslageto kuŝas sinua vojeto pavimita per

skorio, forlasita kaj dezerta. Malmulte da homoj iras sur ĝi eĉ dum taglumo, kaj ĝi des pli fariĝas soleca en nokto. Ĉirkaŭ la lotuslageto kreskas multaj arboj kun pompantaj branĉoj kaj folioj. Unuflanke de la vojeto staras salikarboj kaj kelkaj aliaj arboj, kies nomon mi ne scias. En la noktoj sen lunlumo ĝi aspektas sombre kaj iom makabre. Tamen ĉi-nokte ĝi aspektas tre bone, kvankam la luno lumas pale.

Sur la vojeto nur mi sola paŝas, kun manoj krucitaj malantaŭ la dorso. La vidaĵo antaŭ miaj okuloj ŝajne apartenas al mi, kaj miaflanke mi ŝajne transcendas mian memon kaj troviĝas en la alia mondo. Mi ŝatas hombruadon kaj ankaŭ kvietecon, kaj amas loĝi kun najbaroj kaj ankaŭ resti izolita. Ĉi-nokte, troviĝante sub la pala vualo de lunlumo, mi povas mediti pri io ajn aŭ pri nenio, tiel ke mi sentas min libera homo, kiu povas ignori, kion mi devas fari kaj diri dumtage. Resti izolita estas vera avantaĝo por mi, ĉar mi povas ĝui la senlimajn lotusaromon kaj lunlumon ĉi-momente.

Plene en mia vidkampo prezentiĝas kompakte interligiĝantaj lotusfolioj sur sinua lotuslageto. Ili multe altas super la akvosupraĵo, kiel jupoj de graciaj dancantinoj. Inter tavoloj de la folioj sporade punktas blankaj lotusfloroj, iuj disflorantaj kun belaj pozoj kaj aliaj aspektantaj honteme gravedaj je florburĝonoj, kaj ili vere similas al brilantaj perloj, aŭ steloj sur la lazura ĉielo aŭ belulinoj tuj post banado. Pere de zefiro albloviĝas strioj da delikata bonodoro, kvazaŭ alŝvebantaj kantvoĉo el malproksima alta domego. Ĉi-momente la folioj kaj floroj ekhavas leĝeran ekstremon, kaj la moviĝo fulme rapide transdoniĝas al la transa flanko de la lotuslageto dum palpebruma daŭro, kaj pro tio ekestas serio da malhelaj spuroj de ondetoj inter la antaŭe densaj interligiĝantaj folioj ŝultro-ĉe-ŝultre. Sub la folioj akvo seninterrompe fluas kaj ne videblas ĝia koloro pro folia kovro, tamen kontraste la folioj sin montras reliefe ĉarmaj.

La luno disverŝas la fluantan lumon kviete sur la foliojn kaj florojn. Maldensa kaj delikata nebulo flosas super la lotuslageto. La folioj kaj floroj estas kvazaŭ lavitaj en lakto, ŝajne vualitaj per la sonĝo de malpeza gazo. Kvankam pendas la plenluno en la ĉielo, drivas tavolo da delikataj nuboj en la aero kaj

pro tio la lunlumo ne povas esti tiom brila. Mi tamen konsideras, ke la tempopunkto estas ĝuste bona, ĉar ĉi-momente por mi profunda dormo estas nemankigebla, kaj eĉ dormeto ankaŭ donas alian guston. La luno ĵetas la lumon kontraŭ arbojn kaj projekcias arbetojn tufe kreskantajn sur altaĵoj, kiuj lasas malsame altajn ombrojn de nigraj nuancoj, groteskajn kiel silentaj fantomoj. La belaj maldensaj figuroj de kurbaj salikarboj riveliĝas kvazaŭ pentritaj sur lotusfolioj. La lunlumo neproporcie rebrilas sur la surfaco de la lotuslageto, tamen ĝi kaj tiuj ombroj troviĝas en harmonia melodio simila al fama muzikpeco ludata per violono.

Ĉirkaŭ la lotuslageto, proksime kaj malproksime, supre kaj malsupre, ĉie staras arboj, inter kiuj pli multas salikarboj. Tiuj arboj hermetike ĉirkaŭas la lageton krom kelkaj fendoj flanke de la vojeto, kiuj ŝajne estas speciale aranĝitaj por filtriĝo de la lunlumo. Ĉiuj arboj senescepte sin montras malhelaj kvazaŭ maso da fumnebulo, en kiu oni povas distingi la graciajn pozoj de salikarboj. Super arbokronoj malklare siluetiĝas malproksimaj montoj. Tra la interspacoj de la arboj penetriĝas unu aŭ du punktoj de la lumo de la vojlampoj, malviglaj kiel la okuloj de dormemuloj. Dum tiu ĉi tempdaŭro la plej bruemaj estas cikadoj sur arboj kaj ranoj en akvo, sed mi tenas min muta sen ajna bruo.

Subite mi ekpensas pri kolektado de lotussemoj, malnova moro de la suda regiono alvale de Jangzio. Ŝajnas, ke tiu moro naskiĝis tre frue kaj prosperis dum Ses Dinastioj (222-589 p.K.). Oni povas sciiĝi iom pri ĝia skizo el versoj. Lotussem-kolektantoj estis junulinoj kaj ili kantis amanton, remante boaton por kolektado. Krom tiuj kolektantoj, pri kiuj mi ne volas paroli multe, estis ankaŭ tiuj, kiuj spektis la kolektadon. La plukado de lotussemoj okazis en la sezono ĝojplena kaj romantika. En *Odo al kolektado de lotussemoj* verkita la imperiestro Yuan de la dinastio Liang (555-587) enhavis belan priskribon pri tio:

*Jen par' da junuloj amantaj
rem-movas boaton laŭplaĉe.
Sur pruo sin ĉasas ĝoj-fole,
ja ili kveradas malkaŝe.*

*Jen spite algo-implikiĝon
moviĝas boato iome.
La svelta knabino en blanko
ja alkroĉiĝemas arome.
Ĉe l' sojl' de somera sezono
folioj kaj floroj jun-freŝas.
Amuze kun ridoj flirtante
geparo ludas sin forgesas.
Boato skuiĝas al flanko
retiras sin ili en tango.*

El tiuj versoj oni povas imagi al si la scenon de plezura kaj fola kolektado. Ĝi kompreneble estas interesa afero, sed malfeliĉe ni nun ne plu povas ĝui tian plezuron.

Kaj mi ankaŭ ekmemoras pri aliaj versoj de *Melodio de Xizhou*:

*Navedas oni inter altaj lotus-tigoj
por pluki lotussemojn sude de la lago.
Kun kap' klinita oni serĉas lotussemojn
jen kiuj akvo-klaras en nebula svago.*

Ĉi-nokte, se troviĝus kolektantoj de lotussemoj, jam estas la tempo por ili kolekti lotussemojn, ĉar la lotusfloroj jam altas pli ol homoj. Sed oni certe ne donos atenton al akvo-fluoj dum lotussem-kolektado. Jen kial mi ekpensas pri la suda regiono alvale de Jangzio.

Pensante pri tio, mi eklevis la kapon kaj trovis, ke mi jam atingis mian domon senkonscie. Mi malpeze puŝmalfermis la pordon kaj eniris. Aŭdiĝis nenia bruo. Mia edzino jam dormis profunde de longa tempo.

julie de 1927

Qinghua Universitato, Pekino



elĉinigiŝ

Vejdo (Ĉinio)

Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elperno.cn/penlisto.htm